

ELDONANTOJ:  
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)  
W. M. Page, adv., Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
J. Gili Norta, Barcelona  
Teo Jung, Köln (Kolonjo)  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

REDAKTOROJ:  
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.  
Kun-redaktoro: M. Butin.  
Felletona red.: Zanoni.

ADMINISTREJO:  
Horrem bei Köln, Germ.  
Poŝtekkonto Köln 70865,  
por Teo Jung, Horrem.

ANONCOJ  
el ĉiuj landoj 4 germ. mk.,  
po cm², ĉe grandaj aŭ  
ripetataj anoncoj rabato.

# ESPERANTO

## TRIUMFANTA

Internacia

SEMAJNA

Neŭtrala

Abono ĉi pagas laŭ la taga kurzo de sia propra valuto, se eble per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero, aŭ per ĉeko, sed ne per poŝtmandato. — Abonantoj, kies abono estas finiĝonta, ricevas ĝustatempe **admonilon**. — Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero.

Por Abono oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. — **Prezo de unu numero:** 0.06 dolaro, 0.15 guld., 0.24 ŝved. kr., 0.30 ŝvis. lk., 0.50 dana aŭ norvega kr., 0.50 peseto, 3/2 pencoi, 0.50 fr. aŭ belg. lk., 0.70 liro, 1.20 fmk., 1.40 ĉ. kr., 5 germ. mk. (ankaŭ por baltaj kaj balkanaj ŝtatoj); por rusoj 1 germ. mk., 8. — hung. kr., 35 pol. mk., 35 aŭstr. kr.; internacie 1 respond. kupono.

Por adresŝanĝoj ni kalkulas la prezon de 3 numeroj. — Liston de niaj Abonejoj en diversaj landoj vidu sur paĝo 4! — Germanoj ĝuas altan profiton, se ili abonas ĉe la poŝto (Postzeitungliste, 13. Nachtrag, Ergänzungsheft n-o 3, paĝo 280, sub „Kunstsprachen“).

Atentu:

Ĉu vi legis nian avizon en n-o 79, pĝ. 3, kol. 4, sub la meza faldo?

Numero 83 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 7. Majo 1922.

## Manifesto

al la Instruistaro tra la Mondo

de la Membroj de la Internacia Konferenco de Instruistoj kunvenintaj en la Sekretariejo de la Ligo de Nacioj en Ĝenevo la 18.—21. de Aprilo 1922.

Ni reprezentantoj de 16 registaroj kaj instruistoj el 28 landoj kunvenintaj en la Sekretariejo de la Ligo de Nacioj en Ĝenevo frate salutis niajn kunlaborantojn en la tasko de lumigado de la mensoj de la homoj.

Ni asertas nian kredon, ke je la fundamento de la nuna bedaŭrinda stato, en kiu la civilizita mondo troviĝas, estas la malkompreno kaj malfido, kiuj dividas la popolojn unu de la alia.

Ni asertas nian konvinkon, ke la sola certa kuraĉilo por ĉi tiu malbono estas edukado kaj la principo de internacia alproksimiĝo, por kiuj staras la Ligo de Nacioj.

Ni taksas kiel unu el la plej valoraj kontribuoj al la solvo de la problemo de la rekonstruado de la mondo la internacian helplingvon Esperanto, kaj asertas nian kredon, ke ĝi devas fariĝi parto de la eduka programo de ĉiu civilizita lando.

Ni deziras konsigli al vi la rezultojn de nia sperto en la instruado de Esperanto en lernejoj en diversaj partoj de la mondo.

Ni konstatis, ke Esperanto estas tute sufiĉa por praktika uzado kiel internacia lingvo por ĉiuj celoj parolaj kaj skribaj, por kiuj lingvo estas bezonata; kaj ke krom tio ĝi posedas rimarkindajn ecojn, kiuj pruvas ĝian valoron kiel eduka ilo.

Ĝi valoras kiel helpo por la ĝusta uzado de la patra lingvo, montrita per la plibonigado de prononcado kaj elparolado, pli bona elekto de vortoj kaj scio pri ilia signifo, plibonigado de literado, kaj scio pri gramatikaj principoj.

Ĝi valoras kiel helpo por la akiro de aliaj lingvoj modernaj kaj klasikaj, faciligante la taskon kaj ŝparante la tempon de la instruisto, klarigante la gramatikajn formojn, liverante jam konatajn radikojn, kaj alportante al la tasko de esprimado menson jam kutimitan sin esprimi per pli ol unu lingvo.

Laŭ nia opinio oni devas instrui Esperanton al infanoj, kiel la unuan lingvon post la gepatra jam en la unuagrada instruado. Tio ekipus la lernantojn, kiuj devas eliri el la lernejo je la plej frua momento, per sufiĉa scio de dua lingvo por praktika uzado; ĝi montrus, ĉu tiuj, kiuj iros al la duagrada lernejo, havas kapablon por plua lingva studado, kaj certigus, ke tiuj, kiuj havas tiun kapablon, komencos la novajn taskojn kun preparitaj mensoj, kaj tiamaniere efikus je ŝparado de tempo kaj pli bonaj rezultoj en tiuj studoj; kaj tiuj lernantoj sen la kapablo por lingvostudado povus sin dediĉi al pli konvenaj studoj.

Ni konstatis, ke scio de Esperanto vekis en niaj lernantoj pli realan senton kaj ŝaton al geografio, mondhistorio kaj morala edukado, pli grandan kaj pli simpatian intereson pri fremdaj popoloj kaj iliaj kutimoj, literaturo kaj arto kaj ankaŭ tutmonda paco. Tio estas precipe helpata per la interŝanĝado de leteroj kaj ilustritaj poŝtkartoj kaj desegnaĵoj kun infanoj en aliaj landoj, la legado de internaciaj gazetoj en Esperanto kaj la studado de la diverslanda literaturo en la lingvo. Lernantoj povas partopreni en korespondado post kelkmonata studado de Esperanto. La avantaĝo de tiu korespondado estas, ke ĝi ne koncernas nur unu landon, sed estas ofta sperto, ke lernantoj en unu lernejo havas korespondantojn en multaj landoj.

Per du lecionoj po unu horo en ĉiu semajno lernantoj povas gajni sufiĉan kapablon uzi la lingvon en unu jaro, kio ne estas ebla en iu alia lingvo en tri jaroj.

Ni submetas ĉi tiun Manifeston al via serioza konsiderado kaj kore rekomendas al vi akceli la instruadon de Esperanto ne nur pro ĝia utileco por komerco, scienco kaj internacia agado, sed ankaŭ pro ĝia valoro kiel stimulo al tiu amika interrilatado inter la popoloj de la mondo, kiu estas la vera celo de la Ligo de Nacioj.

pri Jugoslavio. Multaj opinias, ke la stato de Esperantaj aferoj en tiu ĉi lando estas malvigla. Sed oni eraras. Por la honoro de jugoslavianoj estas diri, ke ili ne kriis pri siaj sukcesoj kaj ne trograndigis la faktojn, ĝis la tempo, kiam tiuj montris sin mem jam evidente. Se iu alilandulo vizitus la Societon Esperantistan de Zagreb, li certe mirus, kiom multe da Esperantistoj estas en tiu urbo, kiom viglaj kaj gajaj estas iliaj kunvenoj en la klubejo kaj kafejoj kaj iliaj oftaj ekskursoj tra la pentrindaj ĉirkaŭaĵoj de Zagreb. Urbo Zagreb pli multe ol iu alia urbo en la lando donas por nia movado, kaj ĉi tie oni jam antaŭ longe havis pionirojn de la Esp. movado konatajn tra la tuta mondo; kiel: s-o Maŭro Špicer, s-ino Danica pl. Bedeković, S. Tomić, Kollar-Křm kaj aliaj. La milito kaj grandaj renversoj en la regno lomele haltigis la movadon kaj malentuziasmigis multajn samideanojn, ĝis la nova Esperantista generacio akceptis la aferon en siajn manojn, por jam certe gvidi ĝin al la celo. Kiel gvidanto de tiu ĉi nova Esperantista generacio estis tre energia propagandisto s-ano P. Kastner, kiu edukis novajn samideanojn, instruis la lingvon, malaperante alian tempon kaj eĉ materie subtenante la Societon. La nomo estas tre populara en Zagreba Esp. mondo.

La alia sukcesa en nia movado urba estas la ĉefurbo de Dalmatio Split (itale Spalato) en kiu oni ankaŭ havas viglan Esperantistan movadon, klubon, kelkajn kursojn. La aferon gvidas du fervoraj samideanoj s-oj A. Borčić kaj R. Rupčić, kaj dank' al iliaj laboroj la sukceso fariĝis plej fundamenta kaj varbige.

En Beograd, la ĉefurbo de Serbio kaj de la tuta regno, la movado Esperantista floris jam antaŭ la milito, kaj niaj serbaj samideanoj havis lernolibrojn kaj gazetojn. Sed la malfeliĉa milito, la detruo de la lando preskaŭ mortigis ĉie la Esperantan propagadon. Nur post la milito, serbaj samideanoj eklaboris. Nun en Beograd la movado fariĝas pli kaj pli vigla, ekzistas grupo, ankaŭ „Artista Grupo“, fondita de s-o R. Klajić, kaj unu kurso por oficiraj, gvidata de s-o Jovanović. Oni sentas grandan bezonon de serba gramatiko de Esperanto, de vortaroj ktp., kaj diversaj samideanoj, kiel ekz. s-o S. Adžić en Subotica kaj del. UEA en Ohrid s-o S. Petrović entreprenas paŝojn por tiuj akraj bezonoj.

En la centra de Slovena lando Ljubljana (germane Laibach) nia movado ankaŭ plivigligis, la lastan tempon oni fondis klubon, oni faras kursojn, kaj jam multaj personoj aniĝis al la loka grupo.

Notinda estas la movado inter la blinduloj de Jugoslavio. En la blindulejoj ĉe Moslavina Popovača kaj tiu de Ljubljana, Esperanto estas entuziasme lernata, kaj la blinduloj en Mosl. Popovača jam faris sukcesan Esp. koncerton, gastigante ĉe ĝi Esperantistojn el Zagreb.

La ĵus aperinta Esp. gramatiko de D-ro Maruzzi faris grandan propagadon ĉie tra la lando, publiko montras al ĝi grandan intereson kaj — kio estas la plej grava afero — oni povas legi en la „Oficiala Organo de la Departemento por la Klerigo kaj Konfesioj“, n-o 3-a de 1. Jaro, dekreton sub n-o 2226, en kiu la nomitan gramatikon oni ordonas akiri al la bibliotekoj de popoloj kaj mezaj lernejoj, atentigante pri tio la instruistaron. Ĉerte tiu ĉi dekreto estas unu el la plej gravaj sukcesoj de nia movado en Jugoslavio. La elirinta en Jugoslavio privata Esp. gazeto „La Provo“ estis antaŭ kelka tempo akceptita de Zagreba Esp. Societo por servi kiel ĝia oficiala organo kaj kiel organo de ĵus fondita „Organiza Komitato de Jugoslavia Esp. Ligo“. La gazeto plue aperos sub la nomo „Konkordo“, kaj la estinta redaktejo „in corpore“ restos por plenumi la novajn celojn. „La Provo“ faris grandan helpon al nia movado en Jugoslavio, kunigante la samideanojn, varbante novajn kaj multe laborante por la fondo de Jugoslavia Esp. Ligo.



Redaktejo de „Konkordo“ (estinta „La Provo“).

La sinjoroj estas (de maldekstre): A. Bertoli, sekretario; D-ro Maruzzi, responde redaktoro kaj prezidanto de Zagreba Esp. Societo; N. Hohlov (rusa elmigrinto el Moskvo), literatura redaktanto kaj sekretario de Zagreba Esp. Societo.

Kiel unu el la plej lastaj sukcesoj en Zagrebo ni notu la novan kurson de prof. Fr. Novljan en instruista supera lernejo por la instruistoj. Konsiderante la gravecon de vobado de instruistoj por nia movado, oni devas dankeme laŭdi la entreprenon de nia samideano prof. Novljan. Do, tio estas la plej lakonika skizeto pri Esp. movado en Jugoslavio. La faktol, kiujn ĝi prezentas, montras la progreson kaj sukcesojn, kaj tio ĉi per si mem signifas la progreson kaj sukceson de nia movado ĉie tra la mondo.

Zagrebo.

## Esperanto en Pola Lando.

(Raporto de Pola Esperanto Servo.)

Bydgoszcz, aprilo 1922.

BIALA PODLASKA. La 19. marto en loĝejo de urbdomo okazis solena malfermo de Esperanto-Societo „Espero“. La 9. aprilo oni aranĝis ekspozilon de Esperantaj kaj propagandan paroladon pri Esperanto faritan de s-o Cz. Pruski el Siedlce. La prelegon sekvis deklamo de Esp. versaĵoj. Rezultate: Bone vizitata Esp. kurso.

BYDGOSZCZ. Ĉe la germana popolaltnerejo okazas regule ĉiumarde kaj vendrede priesp prelegoj ligitaj kun Esp. instruado, gvidataj de s-o Pankratz. — Novan kurson pallingvan gvidas s-ano Prengel; partoprenas 15 p. — La rezultato de la respondoj ricevitaj je la en februaro de Pola Esp. Servo dissenditaj kopioj de „Demandaro“ de Ligo de Nacioj estas ĝoliga, kvankam kelkaj societoj bedaŭrinde ne emis respondojn. Plej kompletajn respondojn sendis d-ro Czubrynski, Warszawa, kaj el Kraków s-oj Leopold Dreher kaj Br. Kuhl, al kiuj ni speciale dankas, ĉar ili multe helpis al nia ĝenerala respondo sendita al Ligo de Nacioj.

INOWROCLAW. Kurson kun 12 lernantinoj el V. kaj VI. klasoj de gimnazio gvidas profesoro Orzech. — En „Dziennik Kujawski“ ofte aperas notoj pri Esperanto.

KALISZ. Ekzistas tri grupoj (junulara, por inteligentuloj kaj laborista). S-o Przybylski aperigas artikolojn pri Esp. en „Głos Kaliski“.

KOLOMYJA. S-ano E. Zimandowa ĵus eldonis libreton sub titolo „Esperanto“, gramatyka w 5 lekcjach (Esp., gramatiko en 5 lecionoj) de s-o O. Kuzma, servonta kiel bona enkonduko en nian lingvon.

KRAKÓW. Regule okazas Esp. kursoj rekomencigantaj ĉiun trian monaton, gvidataj de s-ano Leopold Dreher. — Interesa vivo en ĉi tiea societo „Esperanto“, kies prez estas s-o B. Kuhl. — Skolta organo „Plomienie“ publikigas ĉiun duan semajnon konkurson de Esp. tradukado.

LESZNO. S-ano Monarszynski faris paroladon ĉe Junulara Organizaĵo Nacia. Organizigis kurso, kiun vizitas regule 20 seminarianoj.

LODZ. Kurso por junuloj; partoprenas 40 p.

LOMZA. Vigla interesiĝo inter skoltaro, lernantoj de gimnazio, seminarario kaj virina gimnazio. (Daŭrigo sur 3-a paĝo.)

## Esperanto en Jugoslavio.

El la aperinta sur la karto de Eŭropo novaj postmilitaj regnoj, Jugoslavio certe okupas lokon spacie tre konsiderindan kaj geografie tre gravan. Unuflanke el la lingve tre parencaj slavaj gentoj: serboj, kroatoj kaj slovenoj, tiu ĉi lando dank' al kelkaj sube preparolataj kazoj devus esti kaj certe estos unu el la plej fortaj novaj faktoroj de nia Esperantista movado.

Jugoslavio, lando plejparte agrikulturista, prezentas el si unu el la plej grandaj mez-eŭropaj grenmerkatoj kaj ankaŭ estas tre atendinda kiel konsumanto de la superaj fabrikatoj, produktataj en la industriaj regnoj de meza kaj norda Eŭropo. Sufiĉa proksimeco de tiuj regnoj kaj multaj fervojoj ligitaj la landon kun aliaj regnoj ankaŭ ebligas al Jugoslavio rapide kaj konforme al la bezonoj plivigligi siajn import-eksportajn aferojn. Ĉerte, la nuna valuta krizo, kiel ĉe aliaj novaj regnoj, haltigas multajn bonajn entreprenojn de la regno, sed la tempo kaj la naturo iom post iom certe alkondukos la landon al bonstato. Do la ekstera komerco de la lando, kiu jam nun estas tre vigla, devigos la komercistojn uzadi la lingvojn, kaj tiu, kiu ilin uzas, bone scias, kiom bezona kaj aktuala estas la akcepto de unu praktika internacia lingvo. La dua kaŭzo estas la geografio kaj etnografia situacio de Jugoslavio. Per siaj limoj ĝi tuŝas la landojn de albanoj, grekoj, bulgaroj, rumanoj, hungaroj, germanoj kaj italoj, kaj ĝia longa Adriatika marbordo venigas la maristojn de ĉiuj eŭropaj kaj amerikaj landoj al la rilatoj kun la jugoslavia popolo. La lingvoj de ĉiuj najbaraj landoj, krom bulgara, estas tiom diversaj kaj malsimilaj al la jugoslaviaj, ke, por elstudi ilin ĉiujn sufiĉe bone, oni bezonus multajn, multegajn homajn jarojn; sed la regna situacio

tion bezonas, kaj oni studas la lingvojn, rompante al si la kapon. Ne malpli gravan kaŭzon por la disvastigo de Esperanto prezentas ankaŭ la lingvista kapableco de l' popolo, precipe de apudmaraj regionoj kaj de tiuj lokoj, kiuj ĉiam donadis la elmigrantojn al ambaŭ Amerikoj kaj Oceanio.

En la regiono de Kroata „Primorje“ (apudmara lando) oni ĉiupaŝe renkontas hcmojn, kiuj parolas almenaŭ kroate, itale kaj germane kaj uzas la lingvojn kun sufiĉa facileco. Do, kompreninte la bezonon de internacia lingvo; tiuj homoj, konantaj la plej ĉefajn bazojn de nia Esperanto: latinan, de vortaro, el itala; raĉian de vortkunmetado, el germana; kaj logike-konstruan, slavan, el sia patra kroata lingvo; — fariĝas perfektaj Esperantistoj kaj, ricevinte nur malgrandan praktikon, uzas la lingvon kun mirinde bona prononcado kaj facileco.

Grandegan helpon por jugoslavianoj donas la fonetiko kaj la ortografio de iliaj lingvoj. Nature, se oni komparas la alfabeton de Esperanto kaj tiu de serbo aŭ kroato, oni preskaŭ ne trovas diferencon inter ili, krom la transskribo; kaj la maniero de skribado: „Skribu kiel vi aŭdas, legu kiel vi skribas!“ ankaŭ estas tiu de Esperanto. Kiom da malfacilaĵoj prezentas, ni diru, al anglo la alkitimigo al la klara, sonora Esperanta fonetiko, al holandano la sono „s“, al germano sono „i“, al japano „l“, al rusoj la meza „i“, nek mola, nek malmola, la jugoslavianoj jam estas pretaj tuj uzi la sonaron de Esperanto sen iaj malfacilaĵoj. Ili nur lernu la uzadon de Esperanta akcento kaj tuj povos legi, kun enviinda dikcio, Esperantajn tekstojn.

La kroniko de la Esperantista movado en niaj gazetoj donas tre malgrandajn informojn

# La Konferenco en la Sekretariejo de la Ligo de Nacioj.

(Vidu ankaŭ la raportojn kaj ilustraĵojn en nia antaŭa numero!)

Mardo, 18. aprilo, 10 h. matene.

Prof. Bovet malfermas la konferencan parolon al la Generala Sekretario de la Ligo de Nacioj, Lia Moŝto Sir Eric Drummond, kiu faris en angla lingvo paroladon jam konatan al niaj legantoj el n-ro 82. La interpretoj venas de s-o Ĉikao Fujisaua.

Poste prof. Bovet en franca lingvo klarigas la celon de la konferenco, por ke la neesperantistaj ĉeestantoj komprenu la aferon pli bone. Kiel prezidanto oni elektis laŭ propono de s-o Page s-on d-ron Privat, kiu jam prezidas la en Praha starigita komisionon por studi la aferon de Esperanto en lernejoj. Privat siaflanke proponas kiel honorprezidantojn s-ojn prof. Bovet, Sevenhuijsen kaj prof. Cart, kiuj unuanime estas elektitaj. Kiel ĝenerala sekretario oni elektas s-on prof. W. Perrenoud el Ĉernier.

En la unua parolado s-o Privat dankas al la Ligo de Nacioj por la gastigo de la konferenco kaj al la Instituto J. J. Rousseau por la kunvoko de la konferenco. Li mencias, ke la nuna konferenco rezultas el la komisiono elektita en Praha: ĝia giganta laboro multe povas esti helpata per la konferenco, kies ĉefa celo estu, studi kiamaniere havigi al si reciprokecon kaj samtempecon en la Internaciaj klopodoj por enkonduko de Esperanto en lernejoj. Ĉar la Esperanta afero ankoraŭ estas tre modesta, ni ne havu iluziojn. Ni ne postulu, ke la anoj de la registaroj jam nun taksu Esperanton laŭ plena valoro, antaŭ kiam ni montris al ili per saĝa kaj tute preciza maniero la faktojn, kiuj ekzistas, kaj pruvis al ili, ke Esperanto estas pli ol nur granda eksperimento. Ni estu senpartiaj kaj havu antaŭ ni nur nediskuteblajn faktojn — sen trograndigojn. Ni ĉiuj faru klopodon kaj laboru, ke la infanoj lernu la helplingvon, ke ili alproksimiĝu al ĉiuj aliaj homoj. Fine li esprimas la esperon, ke venos la tempo, kiam eble ni Esperantistoj povos helpi al la Ligo de Nacioj en ĝia alvoko al la spiritoj de la homaro.

S-o prof. Cart nome de la Akademio, estis sendinta salutleteron, kiun oni legas.

Nun raportas:

Nicolaief (Bulgarujo): Lauleĝe la nedeviga instruado estas permesita en la ŝtataj mezlernejoj. Ĝis nun estas kursoj en 25 gimnazioj al 800 lernantoj.

Fridrich (Ĉeĥoslovakujo) kiel delegito de ministroj promesas permeson de laŭvola instruado, se ekzistas sufiĉe da kompetentaj instruistoj. Jam nun Esperanto estas instruata en 15 popolernejoj al 450 lernantoj, en 3 mezlernejoj kun 350 kaj en profesia lernejo kun 40 lernantoj. Oni zorgis, ke la uzataj libroj estu oficiale aprobitaj.

Deligny (Francujo) diras, ke en Francujo nur apartaj institucioj, inter kiuj precipe la komercaj ĉambroj, instruas Esperanton, kaj raportas pri specialaj spertoj faritaj de li.

Dietterle (Germanujo) raportas tre detale pri la stato de Esperanto-instruado en Germanujo. Estus laŭge nomi ĉiujn ciferojn ĉi tie. Ni nur menciis, ke Esperanto estas instruata en lernejoj de 123 urboj, kiu nombro kreskos proksimume ĝis 175 en la venonta jaro. En G. oni akcelas, ke nur kompetentaj instruistoj instruu Esperanton en la lernejoj. Precipe grava estas la ekzisto de oficiala Registara Instituto kun ŝtata subvencio.

S-o Page (Anglujo) raportas speciale pri instruado laŭ spertoj faritaj en Eccles, kaj kiu

havis bonegan sukceson. Ankaŭ en Anglujo mankas instruistoj.

S-o Alessio (Italujo) bedaŭras, ke la ministroj estos favoraj al Esperanto nur, se la nacio estos pli multe interesita pri la afero. Kvankam en kelkaj komunumoj Esperanto estas instruata, la esperoj por estanta tempo ne estas tro grandaj, ĉar mankas instruistoj.

S-o Sevenhuijsen (Nederlando) raportas, ke Esperanto estas instruata en 95 urboj de 250 instruantoj. Nur en 2 privataj lernejoj Esperanto estas deviga fako.

S-o Rudhardt (Svisujo) raportas pri eksperimenta instruado de Esperanto al lernantoj de sepgradaĵaj lernejoj, kaj esperas, ke la eksperimentoj estu daŭrigataj.

Kenn (Ĉinujo) parolas pri la grava intereso, kiun la ĉinoj kiel pacema popolo havas por Esperanto. Post diversaj malprogresoj dum la monarĥista reakcio kaj dum la mondmilito nun la movado denove marŝas, kaj laŭ ordono de la ministroj por edukado Esperanto estu instruata (enda! — Red.) en ĉiuj lernejoj.

Nuñez y Rey (Hispanujo) mencias la progresojn de Esperanto en sia lando, ankaŭ inter la policanoj.

Usami (Japanujo) diras, ke — kvankam Esperanto ne jam estas instruata oficiale — tamen multaj kluboj zorgas por instruado de Esperanto. Intereson por la eŭropanoj havis la diro, ke por japanoj Esperanto estas multe pli facila ol angla lingvo, kaj ke la vorfarado en Esp. estas tre simila al tiu en japana lingvo.

Baranyai (Hungarujo) raportas, ke la ministroj de publika instruado permesis, ke Esperanto en 3 lernejoj estu instruata fakultative.

Mardo, 18. aprilo, 15 h. posttagmezo.

Fino Hogg (Anglujo), kiu faris la eksperimenton de Eccles, parolas detale pri la logika valoro de Esperanto, kiun ŝi nomas pensa logika gimnastiko ĉe infanoj. Ili parolas aŭ verkas en Esperanto pli logike ol en gepatra lingvo, kies vortojn ili uzas pli atente post kurso en Esperanto. La studo de Esperanto tre helpas la studon de la gramatiko kaj tial plifaciligas lernadon de aliaj fremdaj lingvoj.

Schamaneck (Aŭstrujo) faris la samajn spertojn, kiajn la antaŭa parolinto. Li diras, ke li en ĉiu kurso rimarkis, ke Esperanto pliprofundigas la gepatran lingvon.

Dixon (Anglujo) mencias la opinion de sia lernejestro en Eccles, ke eĉ, se infanoj ne uzas Esperanton por korespondado, ĝi tute valoras la tempon uzitan por ĝia studo pro la helpo, kiun ĝi liveras ĉe la studo de la gepatrolingvaj vortoj.

Haine (Belgujo) instruis knabojn kaj diras, ke li konvinkigis, ke la latina lingvo tute ne estas necesa en la lernejo por instrui nacian lingvon.

Sevenhuijsen (Nederlando) raportas, ke la studo de Esperanto helpas al la nacia ortografio kaj elparolado kaj atentigas pri ĝi.

Fridrich (Ĉeĥoslovakujo) faris similajn spertojn, rilate ĉeĥan lingvon, ankaŭ ĉe uzado de sufiksoj.

Pomarici (Italujo) akcentas la pedagogian valoron de l'uzo de la akuzativo en Esperanto. La studo de Esp. faciligas la distingon de samformaj vortoj, akriegas la menson kaj la cerbon kaj la observadon.

Ledermann (Germanujo) respondas la demandon, ĉu la lernanto ne iom post iom perdos la intereson pri aliaj fremdaj lingvoj, per: tute kontraŭe. Precipe pli kleraj lernantoj iom post iom sentas lingvan kapablecon; kaj la intereso por fremdaj lingvoj vigligas. La studo de Esp. havas nur unu mankon, ke la lernantoj, konstatinte la tre facilan lerneblecon de Esp. kompare al fremdaj lingvoj, iun tagon povus diri: „Ho, oni forpelu la instruadon de fremdaj lingvoj! Kiam venos la tago, kiam oni ĝenerale enkondukos Esperanton?“

Troegel (Germanujo) parolas pri la punkto de metodo, speciale pri vortfamilioj.

Dietterle (Germanujo) spertis, ke multaj laboristoj opinias, ke ili komprenas la gepatran lingvon nur post kiam ili lernis Esperanton.

Mikkelsen (Danujo) diras, ke Esp. helpas korekti la malbonan elparoladon de la nacia lingvo.

Collinson (Anglujo) raportas pri la granda intereso, kiun junuloj havas por lingvaj demandoj.

Deligny (Francujo) konsentas kun la parolintoj kaj speciale mencias, ke la instrua valoro kaj la pedagogia estas tiel grandaj, ke, se Esp. ne estus uzata en la vivo ordinara, oni devus instrui ĝin pro ĝia pedagogia valoro.

Kenn (Ĉinujo) diras, ke Esperanto estas tiel diferenca de la ĉina lingvo, ke oni ne facile povas kompari ilin. Tamen ĉino bezonas nur du jarojn por lerni Esperanton, dum por aliaj naciaj lingvoj estas necesaj 6—10 jaroj. Esp. faciligas la lernadon de aliaj fremdaj lingvoj. La demandon, ĉu Esp. estas naura lingvo, li respondas per la alia: Ĉu ekzistas vere naura lingvo en la mondo? kaj diras: Ne!

Cze (Rumanujo) ankaŭ akcentas la logikan valoron de Esp. pro ĝia bela strukturo, kiam oni vane serĉas en aliaj lingvoj. Li plue mencias kelkajn metodojn spertojn faritajn de li.

Sinpak (Ĉinujo) diras, ke la riproĉon, ke Esperanto — ne enhavante ĉinajn radikojn — ne estas tutmonda, li povas rifuzi per la provo, ke la formo de Esperanto (vortfarado) estas ĉina. Ankaŭ la malfacilaĵoj rilate la elparoladon ne estas tre grandaj.

Fino D-ro Fisher (Anglujo) opinias bone instrui Esperanton kiel bazon de modernaj lingvoj. Ĝi spertis, ke lernantoj, kiuj unue lernis Esperanton, poste pli facile lernis aliajn fremdajn lingvojn. Oni instruu bilde kaj interparole.

Haine (Belgujo), kiu havas du lingvojn kiel gepatran kaj du lingvojn samtempe en la lernejo, diras, ke estus bone, se oni lernus nur la gepatran kaj la Esp. lingvojn. Tiel oni povus lasi la aliajn fremdajn lingvojn al specialistoj, kiuj ilin deziras.

Mikkelsen (Danujo) nomas Esp. la veran pardonon al la lernado de fremdaj lingvoj.

Pomarici (Italujo) simile diras, ke la komenco de lernado por Esp. estas pli konforma al la pedagogia leĝo pri gradeco. La lernado de Esp. ofte donas al la infanoj deziron lerni aliajn lingvojn. Li ŝatus Esperanton antaŭ la latina lingvo en gimnazioj.

Kamaryt (Ĉeĥoslovakujo) konstata, ke infanoj en lia lando, kiuj antaŭe lernis Esperanton, poste pli bone lernas francan lingvon.

Page (Anglujo) diras, ke per enkonduko de Esp. la programo de la lernejoj ne estus troŝarĝ-

ita, ĉar aliaj lingvoj post Esp. povus esti lernataj des pli rapide.

Hell (Ĉeĥoslovakujo) diras, ke li spertis, ke la lernado de Esp. plifaciligas la postan studadon de la naciaj lingvoj.

Beckmann (Svedujo), kiu ĝis nun ne havis tre multajn spertojn, tamen estas konvinkita, ke la Esperanto enkondukita en lernejojn ne kostas unu minuton, ĉar la tempo estas rekompencita per la facileco lerni aliajn lingvojn.

Prof. Bovet (Svisujo) opinias, ke la multaj esceptoj ĉe la reguloj de naciaj lingvoj, lernataj de infanoj, en ties cerboj formiĝas je granda ĥaoso, el kiu tre malfacile la instruistoj povas fari ordon.

Fino Hogg (Anglujo) raportas pri sia sperto, ke la lernado de Esp. instigas al la lernado de aliaj modernaj lingvoj.

Fridrich (Ĉeĥoslovakujo): La Esp. lingvo helpas al mi instrui la germanan kaj francan lingvojn.

Ledermann (Germanujo) opinias necese, ke ni konvinku la instruistojn de la klasikaj lingvoj pri la profitoj gajneblaj el la instruado de Esp.

Haine (Belgujo) spertis, ke Esp. helpas multe ĉe la studado de la latina lingvo.

Rudhardt (Svisujo) raportas, ke li dum instruado de germana lingvo spertis, ke tiuj, kiuj scias Esperanton, multe pli bone progresis ol la aliaj.

Dubois (Svislando) atestas laŭ propra sperto, ke la antaŭa lernado de Esp. multe helpas ĉe la studo de fremdaj lingvoj.

Nun estas legita kaj akceptita la jena

Propono de D-ro Bovet.

La faktaro kunigita de la Konferenco montras, ke metoda enketo pri la rezultoj de la Esperanto-instruado en lernejoj estas tre dezirinda.

Tiu enketo devos esti farata laŭ la reguloj de eksperimenta pedagogio. Ĝi studados la demandaron proponitan por la nuna Kunveno kaj ĉefe la sekvantajn demandojn:

Ĉu Esperanto malbonigis la uzon de la patrina lingvo ĉe la lernantoj?

Ĉu Esperanto estas malhelpo en la studado de fremdaj kaj klasikaj lingvoj?

Aŭ kontraŭe, ĉu la eksperimentoj de Eccles kaj Bishop Auckland estas sampruvaj en lernejoj de aliaj landoj?

Ĉu la eklernado de Esperanto faciligas poste la komprenon de la gramatiko fremdlingva?

Eksperimentoj tiaj estos diversigitaj laŭ la diverslandaj programoj, sed ĉiam kun pure scienca celo, sen iu ajn antaŭjuĝo.

Por starigi detalan eksperimentan programon la unua konferenco elektas kiel specialan komisionon gesinjorojn Bovet, Fisher, Ledermann, Pomarici.

Ĉi tiu komisiono devos raporti al venonta Esperanta kunveno de instruistoj kaj al la Kongreso en Helsinko.

Post akcepto de la propono la marda kunveno estis fermata. La elektita komisiono poste kunvenis en speciala ĉambro.

(Fino en la venonta numero.)

## El la Intima Libro de la Verdurbaj Esperantistoj.\*

De Ada.

Velkinta folio.

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj  
Foliojn velkintajn deŝiras...  
(El „La Volo“.)

Kiam ni, la Verdurbaj Esperantistoj, kolektiĝis ĉe nia mortanta prezidanto, por aŭskulti lian lastan parolon, inter ni aperis maljuna homo, kies vizaĝon mi iam, en tre malproksimaj tagoj, estis vidinta, sed jam delonge forgesinta. Mi memoris, ke li estis vidata en la Esperantaj kunvenoj, kiam mi estis ankoraŭ nova Esperantisto. Sed dum multaj, multaj jaroj li ne aperadis kaj oni forgesis lin.

Kaj jen neatendite li aperis por diri la lastan „adiaŭ“ al sia iama kunbatalinto.

Kiam li venis, ĉiuj turnis al li la okulojn kun ekmiro. Murmura, mallaŭta demando eksiblis. „Ĉu li estas Esperantisto?“

Mi mem kun dubo ekpensis: „Ĉu li efektive estas Esperantisto?“

Min tre interesis, kion li sentis, dum nia mortanta samideano diris sian testamentan parolon. Mi rigardis lin atente. Sed, krom la komuna ĉagreno, nenia aparta emocio estis legebla sur tiu griziginta vizaĝo. Kaj tamen, mi pensis, nepre okazas io superordinara en lia animo. Ne povas la testamentaj vortoj de l' mortanto ne tuŝi iun kaŝitan kordeton en lia koro, kiu iam sonigis melodiojn... se li estis efektive Esperantisto.

Kiam ni forlasis la domon de nia mortinta samideano, mi ekmarŝis kun unu el niaj malnovaj samideanoj kaj demandis lin pri tiu homo, kiu vekis ilom da demandoj en mia animo.

La kunmarŝanto klarigis:

„Iam, antaŭ jaroj, li estis vigla Esperantisto, kaj eĉ pli vigla propagandisto. Li kaj liaj kamaradoj preparis la kampon, sur kiu ni nun agas... Ili estis kelkaj. Et ili fidele sekvis la vojon ekirita nur unu — ĉi tiu, kies korpon ni ĵus lasis senviva... Ne, eltenis pacienc' la ceteraj, la vivo ilin laciĝis kaj ili jam dormas.“

„Mi apenaŭ memoras lin,“ diris mi. „Kia domago, ke la junula entuziasmo ne restas konstanta.“

„Ne ĉiu povas esti heroo,“ lakone interrompis min mia kunmarŝanto.

„Sed kio ĝis tiun ĉi eksbatalinton veni nun por diri adiaŭ al sia iama kunlaboranto?“

„Mi ankaŭ ne povas bone kompreni tion. Tre verŝajne, ne estingiĝis ankoraŭ la lasta ereto de la iama fajro en la animoj de tiu Esperantista generacio. Certe ie profunde, kovrite per cindro, bruletas fajrero, kiun eĉ ili mem ne konscias...“

„Ili restos certe en la vasta, inerta maso de la neagantaj, neorganizitaj Esperantistoj, kiu maso tamen estas latentia forto de nia agado. Sed ŝajnas al mi, ke neniu el niaj nunaj agantoj povus iam eniri en tiun mason... La ideo multe pli profunde penetris en la animojn de nia nuna generacio.“

„Mi ankaŭ volus kredi tion. Ni nun estas en aliaj cirkonstancoj ol la antaŭaj Esperantistoj. Tamen ilin ni ne kulpigu, ni ne estu severaj kontraŭ ili... Ili laboris, kaj ilia laboro kreis la cirkonstancojn, en kiuj nun ni laboras eble eĉ ili mem ne scias tion! Jen ekzemple tiu ĉi persono, pri kiu ni parolis, instruis al mi Esperanton. Mi lernis en kurso, kiun li gvidis.“

„Li gvidis eĉ kurson?“

„Ho jes, kial ne? Venu kun mi hejmen, mi montrus al vi dokumentojn pri lia agado.“

Ni duope iris en la hejmon de mia kunparolanto. Li elprenis el sia biblioteko kelkajn librojn kaj broŝurojn, sur kiuj la jaroj jam estis metintaj sian sigelon. Kun intereso mi ekrigardis ilin. Tio estis malnovaj, jam delonge elĉerpitaj kaj nun netroveblaj libroj. Kelkaj el ili estis konataj nur per sia titolo al la novaj Esperantistoj. Inter ili estis malgranda lernolibro de Esperanto, Esperanta vortareto, propagandaj broŝuroj, verkitaj iam de la homo, kiu estis nun la kaŭzo de nia interparolado.

„La lernolibro ne estas modela kaj senerara,“ min informis mia samideano. „Ankaŭ en la broŝuroj estas naivaĵoj... Sed ĉu oni povis postuli de unuataj libroj ĉion? Ili merite ludis sian destinitan rolon, kaj tio sufiĉas. Jen estas artikolo de li por Esperanto.“

Li donis al mi malnovan numeron de ĵurnalo. Mi eklegis.

„Konsiderante tiun ĉi artikolon, oni estas devigata konkludi, ke ĝia aŭtoro estis fervorega Esperantisto,“ mi diris. — „Kaj certe li estis tia iam. Sed nun?“

„Sed nun? Nun la Esperantistoj demandas sin, ĉu li estas Esperantisto.“

„Kaj li forgesis la tempon, kiam li laboradis por Esperanto, kiam li faris oferojn... Kia domago! Sed mi tamen ne povas kompreni: ĉu estas eble ĝis tia grado malvarmiĝi al amita afero? Kio povus kaŭzi tion?“

„Mi ankaŭ ne scias. Ekzistas momentoj, en kiuj mi kredas, ke estas tre facile respondebla tiu ĉi demando: ili laciĝis kaj ĉesis... Ĉu la samo ne estas konstatabla en ĉiuj movadoj? Sed venas momentoj, kiam mi ne povas kontentigi min per tia rezonado. Mi sentas, ke tamen estas io nekomprenebla en tiu ĉi fenomeno. Tio

estas la horo de l' duboj. Kaj mi ekpensas kun malĝojo: Ĉu ili estis efektive Esperantistoj? Ĉu ili ne estis predikantoj, nekonvinkitaj pri siaj propraj predikoj? Pro kio ili flamiĝis fajron en la animoj de aliaj, se en siaj propraj ili ne povis konservi ĝin? Sed en tiaj momentoj mi prenas iliajn verkojn kaj, eklegante, mi vidas, ke mi ne estas prava dubi; mi eksentas en tiuj verkoj la saman koron, kiu batas nun en la tuta Esperantistaro... Kaj ree mi venas al la penso, ke nur la trolacigo ilin forigis el la kampo de la aktiva laborado por Esperanto... Enigma, kiun eble ili mem ne povus solvi. Fakte nedubebla estas, ke en lia animo estas kaŝita sekreta fajrero por Esperanto, sed — ve! — fakto estas same, ke ne plu naskas flamon tiu ĉi fajrero.“

Mi aŭskultis kaj meditis. Malĝojaj estis miaj pensoj.

Subite mi eksentis fortan alfluron de kredo, kaj decide mi diris:

„Ne, ili ree ekflamos. Venos tiu ĉi momento, kiam ekverdiĝos la velkintaj folioj... Hodiaŭ unu venis por vidi la mortantan kunlaborinton. Certe en lia animo io ekmoviĝis... Tio ĉi estas jam moveto de homo, kiu ekvekiĝas. — Morgaŭ li serĉos nin!“

„Utinam!“ — sopire diris mia samideano.

La horloĝo.

Al mia fileto mi donacis horloĝon.

Ho, kiom li ĝojis dum la unua tago! Ŝajnis, ke ne povus ekzisti sur la tuta tero pli feliĉa homo ol li.

En la dua tago ĝi komencis serĉi la neperfektaĵojn de la utila objekto.

Latina Esperantiginda konjunktio, kiu esprimas deziron, ke io estu aŭ okazu.

Lernas Esperanton 120 p. sub protekto de s-o Jan Kronenberg. Skolta gazeto „Czuwaj“ ofte aperigas artikolojn pri Esperanto.

MIEDZYRZECZ. S-o H. Brukarz gvidas laŭvice duan Esp. kurson.

POZNAN. Nova kurso pollingva en urba lernejo ĉe str. Garncarska. Same okazas nova kurso germanlingva en komerca lernejo de d-ro Grossstüick. — Gaja libervola kunveno ĉiumerkrede en restoracio de „Bauhütte“.

RAKÓW. Du Esp. kursoj por lernantoj kaj ferlaboristoj (sume 24 p.), gvidataj de Instruisto s-o Gluchowski.

SIEDLCE. F-ino Lebenstejn gvidas kurson por hebreaj melistoj (16 p.), f-ino Czarnobroda por 15 p.

WARSZAWA. Fondiĝis sekcio de TEKA. En ĵus okazinta kunveno prelegis d-ro Róbin referaton de d-ro Blasberg pri „Esperanto kaj medicino“. — La 26. marto vizitis la urbon s-o Inazo Nitobe. Lin akceptis societo „Konkordo“, kies sekretario, f-ino d-ro Muszkatblat faris saluiparoladon kaj samtempe transdonis en la nomo de la societo al s-o Nitobe memorskribon.

Prengel, gvid. de Pola Esp. Servo.

Ĉiujn sciigojn pri Esp. movado en Pola lando oni sendu, se eble, tuj aŭ almenaŭ regule ĉiumonate laŭ adreso: Pola Esp. Servo, Bydgoszcz, Kordecktego 1a. Multobligite la sciigojn. ni dissendas ilin al la tutmonda Esp. gazeto. Esp. Societoj komisiu al siaj sekretarioj aŭ aliaj kompetentaj personoj, ke ili regule raportu al ni. Manku neniu urbo kun Esp. movado en la vico de raportantoj!

## Revelo-Kongreso en Hagen.

Kiel kutime, ankaŭ la nunjara Printempa Kunveno de Rejnlanda Vestfalia Esperanto Ligo (Revelo), kiu okazis la 29. kaj 30. aprilo en Hagen, allogis grandan nombron da partoprenantoj. La cifero de la aliĝoj estis preskaŭ 500, do ankoraŭ superis tiun de la Printempa Kunveno en antaŭa jaro. Pro tio oni povas kompreni, ke ne ĉio iris tute laŭ deziro; ĉar ankaŭ aranĝo de kongreso postulas specialan sperton.

La vetero komence favoris la kongreson kaj bone influis la humoron, kiu estis vere brilega dum la interkonatiĝa vespero (sabate) en la bela salono de l' Parkdomo. Koncerto, saluiparoloj (i. a. s-ano Edm. Fethke transdonis la salutojn de la Polujaj Esperantistoj), komunaj kantoj kaj poste dancado kunigis la festantojn ĝis matena horo. Malgraŭ la eksterordinare bonega humoro oni tamen ne sufiĉe sentis sin en Esperantujo, ĉar oni respektis tro multe la neesperantistajn gastojn.

Dimanĉon matene okazis la laborakunsido, ekspozicio kaj publika parolado en ejoj de Maŝinkonstruata Lernejo.

En la laborakunsido oni aŭskultis koncizajn raportojn pri la agado de l' estraro kaj pri traktis la novajn statutojn de GEA, pri kiuj oni decidis pentekoste en Breslau; poste mallonga parolado de s-o rektoro Trarbach el Elberfeld pri Metodo de Esp. Instruo, en kiu li kritikis la lernolibrojn ĉefe uzatajn en la Revela regiono.

Granda, bone ordigita ekspozicio ne povis efiki sufiĉe multe, ĉar la disponigita ĉambro estis tro malvasta. Pro la sama kaŭzo regis vera interpuŝiĝo inter la publiko, kiu montris grandan intereson por la ekspozicio.

La publika kunveno okazis en la granda aŭlo de la nomita lernejo. Nome de l' urbo kaj de l' ĉefurbestro salutis s-o urba lerneja konsilisto d-ro Reuss, dirante i. a., ke ni ĝenerale ne esperu tro multe da subteno de oficialaj rondoj. Granda

En la tria li jam komencis malmunti ĝin, por forigi la nebonaĵojn kaj perfektigi la maŝineton. Kiam li remuntis ĝin, la horloĝo funkciis nur dum kelkaj minutoj kaj haltis. De tiam mia fileto ne povas plu uzi ĝin kun utilo. Li nun havas okupon nur flegadi la horloĝon, malmuntante, rearanĝante la radojn, purigante kaj kunvolvante la risorton. Kaj la mirinda ilo, kreita por servi, restis nur bagatela prizorgaĵo.

Ne estas por infanoj delikataj objektoj. Ni gardu ankaŭ Esperanton kontraŭ la manoj de infanoj de infanoj havantaj lipharojn!

### La veturilo.

Sur kruta monto, tra mallarĝaj kaj ŝtonoplenaj vojetoj grimpas homa multego alten. Supre estas plata, iom dekliva ebenaĵo. Tie oni facile marŝos al la persekutata celo. Sed kiel oni atingos tiun ĉi ebenaĵon!

Sur larĝeta vojo homo puŝas veturilon. Li admonas la ceterajn, helpi lin: per komunaj fortoj ili tre facile alpuŝos ĝin al la supro, kaj tie la veturilo per propra forto povos veturadi rapide laŭ la ebena deklivaĵo, portante sur si tiujn, kiuj ĝin suprenigis.

Malmultaj tion komprenis. Tre malproksime ŝajnas la supro. Malmultaj manoj ekkapias la veturilon kaj puŝas ĝin. Svito kovras iliajn fruntojn. Unuj laciĝas kaj ĉesas, aliaj venas. Dume la cetera multo grimpas tra la neoportunaj vojetoj...

Pasas tempo. La veturilo proksimiĝas iom post iom al la supro. La puŝantoj konstante plimultiĝas. La supro estas jam proksima. Amasiĝas la puŝantoj. La veturilo rapide, facile sin movas supren. Neniu plu sentas lacecon. Ĉies okuloj brilas konfide. Baldaŭ la veturilo ek-ruliĝos sur la ebenaĵo kaj rapide, rapide ekportos la homojn al la celo...

## La grupeto ERA (Esp. Rondo Amika) en Budapest.

(Vidu sur ĉi-suba bildo s-anon Julio Baghy sidantan en la mezo.)

Dolĉaj melodioj ektuŝas niajn orelojn! Kio okazas? La grupeto ERA komencis sian ordinaran kunsidon! Proksimume dudek membroj de la Landa Societo el la plej juna generacio de Esperantistoj kunsidas kaj kantas laŭ gvidado de kantisto Sárosi. Poste „gvidanta amiko“ Zimmermann malfermas la kunsidon per salutaj vortoj, li ĝuste laŭlegas el la kongresa parolado de Karmarj pri la sen-nomaj kaj sen-nombraj kunlaborantoj por nia lingvo. Sekvas ibera parolado de junulo pri temo, kiun „honora amiko“ Julio Baghy ĉiam antaŭe donas al la junaj gemembroj. Ĉar s-ano Baghy fondis per siaj gelernantoj tiun ĉi grupeton, per kiu li sukcesas ne nur kurenti la gelunulojn en amika rondo, sed ankaŭ konservi ilian intereson por nia movado. Ili partoprenas aŭ plej ofte memstare aranĝas festojn, ekskursojn kaj literaturajn verperojn. Sed literatura vespero estas jam ĉiu kunveno mem. Ĉar post la parolado, ofte surprize bona, sekvas



deklamadoj de la gemembroj, al kiuj kelkfoje al- iĝas klarigoj, paroladoj aŭ deklamadoj de s-ano Baghy, de s-ano Balkányi, kantado de s-ano Sárosi kaj de aliaj. La tutan membraron oni ja povus citi, sed tio estas ĉi tie nebla. La grupeto estas malgranda, ĝi havas nur 28 membrojn; sed ili efektive laboras, kaj la fonda de similaj grupetoj estus konsilinda al ĉiuj kursgvidantoj. Nur per konstanta interresigo de la nov-aj samideanoj oni povas konservi ilin kaj nur per konservado de la Esperantistoj per aferoj, kiuj interesas kaj kuntenas ilin, nia movado povos reale kreski kaj triumfi! La kunsidoj finiĝas per kanto de la Espero, kaj foririnte ni devas rememori la devizon de ERA:

„... homeco estas plej alta idealismo“ — kaj tie oni instruas homecon!  
(Rim. de Red.: Kvankam iom malnova, tiu ĉi raporto pri ERA estas ankoraŭ aktuala.)

## Milit-partoprenintoj!

Pasinta estas la sesjara batalado de l' popoloj kun sia teruro kaj detruado, kaj ree la vivo fluas pace, ekstere plena je brilo kaj esperoj; sed tie kaj ree, kvazaŭ splitojn sur la surfaco de l' fluanta akvo, puŝatajn de l' vento kaj ondoj, oni rimarkas unuopulojn ne povantajn moviĝi kun tiu vivo ĉiam celanta antaŭen. Tio estas ni, militintoj, kiujn dum la pasinta popola intermilitado la kruela sorto igis dispecligi korpe unu la alian, aperigante per tio aron de milionoj da homoj bezonantaj fremdan helpon — la invalidojn.

Tiuj samaj partoprenantoj je la fluanta vivo iam nomis nin malamikoj kaj igis nin mortigi unu la alian.

Nun kiam ni per nia propra mano estas senigitaj jen de la pledo, jen de la mano, jen de la sano, ni ree fariĝis fratoj kaj anoj de l' komuna familio invalida. Komunaj estas niaj sentoj, bezonoj kaj suferoj, kaj firma devas esti la ligilo inter ni.

Unuope ni ĉiuj estas unuigintaj en nia propra lando, sed tutmonde ni ĝis nun ne havis la eblecon etendi al ni la manojn, ĉar inter ni ja regis lingva malkompreno, kiu ankaŭ estis la ĉefa kaŭzo de tio, ke ni dispecligadis unuj la aliajn kaj nun en mallumo kviete suferas.

Sed nun ja per la internacia lingvo ni povas forigi la lingvan malkomprenon; estas ebligite al ni, per komuna lingvo informi la tutan mondon pri niaj suferoj kaj meritoj.

Ni do kuniĝu por tio sub la internacia standardo Esperantista, ni influu la unuigojn kaj societojn en niaj helmlandoj tiel, ke ili ebligu al ni la el-lernadon de Esperanto, — kaj tiam ni parolu pri niaj sentoj kaj suferoj, klarigante per tio nian situacion al tiuj, kiuj sen ia malhelpo ĝuas la plezurojn de la vivo kaj kiuj iam instigis nin al reciproka ruinigo. Skribu, invalidoj, pri via vivo kaj milit-aventuroj en internacia jurnalo, — tio forigos multe da malbono je nia utilo!  
Invalido K. M.

subteno jam estas, se oni ne malhelpas nin. Ni pruvu la forton kaj valoron de nia movado per serioza laboro; tiel ni akcelos la tempon, kiam ankaŭ la oficialaj rondoj energie subtenos Esperanton.

Seminaria direktoro d-ro Schäfer el Hagen salutis kiel pedagogo. Li diris, ke jam antaŭ pli ol 30 jaroj li interesiĝis pri internacia lingvo, speciale pri Volapük, kiun li tamen ne opiniis taŭga. Kvankam li ne estas Esperantisto, li jam aŭdis pri Esperanto antaŭ 15 jaroj, kaj li dankas ankoraŭ hodiaŭ s-on Arntz el Godesberg, kiu lin tiam atentigis pri Esperanto, ĉar kiel pedagogo li ekkonis la valoron de Esperanto.

La publikan paroladon faris seminaria direktoro d-ro Möbusz el Lübeck. Lia parolado ne estis propaganda parolado laŭ la kutima kaj limigita senco de l' vorto. Li rigardis la ekzistadon de Esperanto kiel fakton kaj akcentis la praktikajn avantaĝojn de Esperanto, precipe por la lernejo, kiun li — kiel sperta pedagogo, aŭtoro de lerniloj ktp. — povas plenkonvinke defendi.

Fine s-o Instruisto Petermann prezentis Esp. klason. La infanoj komence iom timeme, sed poste brave kaj kun vera ĝojo respondis ĉiujn demandojn kaj fine kantis Esperante. La instruisto same kiel la infanoj parolis nur en Esperanto. Riĉa aplaŭdo rekompencis ilin.

Posttagmeze estis aranĝita ekskurso al Hohenlimburg. Malgraŭ la intertempe malfavoriĝinta vetero (la aprilo sendis kiel lastan saluton malsekan pluvon, kiu ne ĉesis dum la tuta tago) pli ol 200 personoj partoprenis ĝin. En Hohenlimburg kafotrinkado, muziko, kantoj kaj dancado.

Multaj partoprenantoj forveturis dimanĉe vespere, sed kelkaj restis ĝis lunde tagmeze, t. e. ĝis kiam la suno reaparis — nun jam ne vualita aprila, sed gaja maja suno.

La celo estas la feliĉo de la homaro. La ebenaĵo estas la kampo de komuna reciproka kultura vivo. Progreso estas la vojo al ĝi.  
Kaj la veturilo? — Tion vi mem divenu!

## Diversaĵoj.

Pri la influo de la suno sur la teraj okazaĵoj.

Iu franca sciencisto, d-ro Gallois, faris gravan eltrovon: li konstatis, certe kun granda miro, ke la ĉefaj datoj de la franca historio: 1793, 1815, 1848, 1870 kaj 1914 estas ekzakte divideblaj per la nombro 11. Li longe demandis al si, kio povis esti la kaŭzo de tiu siranga fenomeno.

Paralele konstatante, ke la suno, je ĉiu dek-unua jaro, pligrandigas sian aktivecon, kovriĝante per makuloj, kiuj estas fortegaj erupcioj, kaj jetante al ni radiojn pli varmajn ol ordinare, tiu sciencisto pensas ke iu korelativo povas ekzisti inter la plifortiĝo de la suna aktiveco kaj la pligrandiĝo de la teraj okazaĵoj.

La psikologoj studu! R. L., Lyon.

### Metalaj ŝuoj.

En la franca urbo Vienne, iu malriĉa laboristo pretendas esti elpensinta novan metal-miksajon por fabriki neeluzblajn ŝuojn.

Li miks fabrikis unu paron, kiun li surhavas kaj kies ekstera aspekto ne diferencigas de tiu de ledaj ŝuoj.

Li intencas startigi grandan fabrikejon, per kiu li povos liveri tiajn ŝuojn je tre malalta prezo.  
R. L., Lyon.

## Gazetaro.

Sheffield Weekly News, 10. 4. (Esp. fako de J. Merchant, 2 kolonoj.)  
Folkestone Herald, 18. 3. (Esp. la plej muzika lingvo.)

Yorkshire Weekly Post, Keighley News kaj Yorkshire Post: raportis pri la konferenco de Yorkshire Esp. Fed., fine de marto.  
Aberdeen Express, 22. 3. (Art. pri sukceso de Esp. kurso en Aberdeena Centra Lernejo.)  
The Times, London, 23. 3. (Recenzas en la literatura aldono libron de A. Guérard pri lingvo internacia.)  
New York Herald, Pariza eldono, 11. 4. (Esp. konferenco en Genèvo.)  
Journal de Sotteville, Franc., 11. 3. (Esp. fako.)  
Le Midi, Toulouse, 13. 3. (Esp. kroniko.)  
L'Avenir, Paris, 11. 3. (Esp. kaj scienco.)  
Le Rappel, Paris, 11. 3. (Esp. konferenco en Genèvo.)  
Le Courrier de l'Ain, Bourg, Franc., 22. 4. (Esp. kaj Foiro de Paris.)  
Le Télégramme de Toulouse, 10. 4. (Esp. kaj Pariza komerca ĉambro.)  
Roma, Napoli, Ital., 12. 4. (Artikolo.)  
Corriere di Napoli, 6. 4. (Artikolo.)  
Gazzettino Universitario, Napoli, 15. 4. (Detala artikolo pri Esp. de F. Cesarini.)  
Rinascita, Napoli, 18. 3. (Artikoloj pri Esp. kaj Esp. kurso de F. Cesarini.)  
Frankfurter Messzeitung, Frankfurt, 22. 4. (Art. pri Germ. Esp. Instituto.)  
Danziger Volksblatt, 22. 4. (Esp. angulo)

## Ĉu?

La ĉefredaktoro kaj la administristo de ET vizitis la dutagan Revelo-Kongreson en Hagen. Reveninte, ili trovis 107 poŝtaĵojn, kiuj alvenis dum ilia foresto. Estis 3 paketoj, 10 reg. leteroj, 17 ordinaraj leteroj, 54 poŝtkarto, 20 gazetoj kaj presajoj, 2 poŝtekaŭzoj kaj 1 poŝtmandato.

Ĉu estas eble, tuj kaj detale respondi tian amason da korespondadoj kaj krom tio redakti jurnalon, verki raportojn, ordigi kartotekon ktp.? Certe ne!

Kelkcentoj da korespondadoj kuŝas ankoraŭ nereponditaj el antaŭaj semajnoj. Multaj el ili enhavas tute naivajn dezirojn aŭ demandojn, aŭ eĉ ne koncernas nian entreprenon.

## Mallongaj Esp. Sciigoj.

I-a Tutestonia Esp. Kongreso okazis la 2. aprilo en Tartu (Dorpat). Partoprenis 82 gesamideanoj el Tartu, Tallinn (Reval), Narva, Valk, Paide kaj aliaj lokoj. Pri la kongreso ni ricevis detalan raporton, kiun ni devas prokrasti pro la pli gravaj raportoj pri la konferenco en Genèvo.

### Kongresa ŝipo haltos en Danzig.

Laŭ sciigo de la Varboficejo [por Esp. Kongreso 1922 en Libera Urbo Danzig la kongresa ŝipo de Lübeck al Helsinki haltos en Danzig.

### Esp. kiosko en la Foiro de Paris.

La Esp. Grupo de Paris havos grandan kioskon n-o 1005, Champ de Mars, ĉe la ĉefa enirejo. La komitato de la Foiro donis ĝin senpage. Ĝi ankaŭ aperigis cirkulerojn kaj kolorajn afiŝojn en Esperanto.

### Hejmveturo de aŭstraj infanoj el Hispanujo.

La 24. aprilo, matene, forveturis al Graz d-ro pastro Josep Casanovas, del. de UEA, akompanante 53 aŭstrajn infanojn, kiuj estis gastigitaj dum pli ol unu jaro en la provinco de Girona (Katalunujo, Hisp.). Ĉiuj forveturis kontentegaj kaj kun „multaj kronoj“ aŭstraj. Multaj samideanoj adiaŭis ilin. En la provinco Girona estas ankoraŭ pli ol 20 geinfanoj, kiuj estos gastigitaj dum pli longa tempo.

### El Svislando.

En Bern la movado progresas. La grupo kunvenas ĉiuvendrede en hotelo Ruof. Ĉiuj lokaj gazetoj raportis pri la konferenco en Genèvo kaj la Esp. tago en Basel (23. aprilo). Antaŭ kaj post la kongreso ni havis viziton de kelkaj eksterlandaj gastoj. S-o d-ro E. Spielmann gvidas kurson por poŝt-, telegraf- kaj telefon-oficistoj (28 gelernantoj).

En Burgdorf fondiĝis grupo de 10 membroj post propagando de s-o Schafroth kaj kurso de s-o Perlet el Bern. Prezidanto: S-o Scharrer, poŝtoficisto.

### Laborista konferenco en Linz (Aŭstrio).

Sekvante la ekzemplon de aliaj landoj, ankaŭ la aŭstria laboristaro kunigis por fondi la unuigon „Aŭstria Laborista Ligo“, kies konferenco okazis la 25.—26. marto en Linz. Ĉeestis 35 delegitoj el 6 distriktoj. La kongreso kaj la bone vizitita literatura ekspozicio atestis la intereson de la popolo kaj gajnis multe da interesuloj. Pro tio denove oni devis aranĝi kursojn de Esperanto. La sidejo de la Ligo estas Linz, Humboldtstr. 46.

### Esp. revolucia grupo en St. Ouen

apud Paris komencis Esp. kurson.

### Hungara Landa Kongreso en Miskolcz.

La komitat-kunsido de la Landa Esp. Societo en Budapest akceptis inviton de la grupo „Harmonio“ en Miskolcz aranĝi tie Landan Esp. Kongreso. La proponon subtenis la urbestro de Miskolcz.

La 24. aprilo estis bone vizitita kunveno en la Socia Muzeo, kiam s-ano Andreo Ce, la rumana ĉefdelegito, revojaĝante de la konferenco de Genèvo, raportis pri tio al la budapestanoj.

En Debrecen s-ano Treska Forgon komencis kursojn.

En Szentes estis bonsukcesa ekspozicio.

### Esperanto en Japanlando.

Ni elĉerpas el „La Revuo Orienta“: Tokio. Esp. kurso al lernantoj de Selkei Liceo. En 3-a liceo la direktoro kaj 26 instruistoj lernas Esperanton. Kurso ĉe Asocio de Ĉinaj junuloj kun 35 p. 2 kursoj ĉe Nippon Esperanto-Sya.

Kioto. Nova (kvara) kurso por urbanoj en Kasuga elementa lernejo.

Do, estas tute neeble por du personoj, tuj, akurate kaj detale respondi tian amason da korespondadoj. Ni nepre povas respondi nur al la plej gravaj; ĉiuj aliaj devas atendi, ĝis kiam nia laboro malgrandiĝos aŭ ĝis kiam la enspezoj el ET tiom kreskos, ke ni povos dungi pluan helpanton.

Volonte ni plenumas dezirojn de niaj abonantoj laŭpove; sed bonvolu redakti viajn leterojn kaj poŝtkartojn seble tiel, ke ili ne bezonas specialan respondon. Pri abonon, ekzemple, aŭ pri anoncoj ktp. ĉiuj informoj estas troveblaj sur la paĝoj de ET. Do ne malfaciligu nian laboron per bagateloj, por ke ni povu plenumi almenaŭ la gravajn kaj gravetajn korespondadojn.

## Foiroj.

Foiro kaj ekspozicioj okanzontaj dum 22.—31. majo 1922.

22.—25. Luzern. Peltoj.  
22.—25. Breslau. Agrikulturaj maŝinoj.  
24. (ĝis 5. junio) Barcelona. Aŭtomobiloj.  
25. (ĝis 3. junio) Birmingham. Ekspozicio de artoindustrio.  
28. (ĝis 5. junio) Praha. Int. Spec. Foiro.  
Krome okazos en majo Foiroj aŭ Ekspozicioj en Bruxelles, Quito, Zeitun-Burin (Turkujo), Kovno-Kaunas (Agrikulturo), Budapest (Foiro), Wien (Spec. Foiro), Florenco (Libroj), Cardiff k. Limoges.

## Por „Esperanta Ligilo“

ni ricevis pluajn donacojn: 218. Tamberg, Tallinn 60 gmk. — 219. Anoi de „Espero“, Tallinn 70 gmk. — 220. Pedro Gomez, Buenos Aires 100 gmk. — 221. A. Villafranca, Buenos Aires 100 gmk. — 222. Fritz Hirzel, Zürich 5 sviz. fk. — 223. Esp. grupo Horst-Emscher 80 gmk.

# Recenzejo.

LIBROJ.

AMA STELARO. De La Forgesito. 119 pĝ. kaj kovrilo. 10:14 cm. Eldonejo Oskar Ziegler & Co., Markt-Redwitz (Bayern, Germ.). Prezo 18 gmk. por alvaluta eksterlando 27 gmk

LEAKEY'S INTRODUCTION TO ESPERANTO. 36 pĝ. karion. London 1922. The Dreadnought Publishers, 152 Fleet Str. E. C. 4. Prezo 3 pencej.

ESPERANTO-KATECHISMUS. 50 Fragen mit Antworten. De Hanns Sappl. Paulus-Eldonejo, Graz, Karmeliterplatz 5. 32 pĝ. kaj kovrilo.

La libreto estas laŭ enhavo bona kaj taŭga, kvankam ĝi ne prezentas novajn ideojn. Oni evitu ĉe tiaj verkoj tro ofte paroli pri „hodiaŭ“ kaj „nuna tempo“, ne montrante la daton.

GAZETOJ.

The British Esperantist. Aprilo. Informa Bulteno (katalunlingva) de Barcelona Esp. Soc. N-o 1. Adreso: Rambla de Estudios, 12, pral. Bulgara Esperantisto. Marto. Espero Katolika. Aprilo. Holanda Esperantisto. 20. aprilo. Mario. Aprilo. La Verda Ombro. Jan. Arguso. Marto. Bulletin Français-Ido. Marto-aprilo. Kosmoglott. Aprilo. Hungara Esperantisto. Aprilo. Kataluna Esperantisto. Aprilo. Esperanto Praktiko. Aprilo.

PROSPEKTOJ, AFIŜOJ ktp.

AFIŜO pri Belga Esp. Kongreso, St. Nikolaas, 4.—5. junio 1922. Formato 60:77 cm. La aŝiso estas efika pro sia grandeco; ĝi estas interese farita, sed iom malklara. Koloroj: nigra, verda, flavebruna.

# 50000

germanajn markojn ni deziras pruntepreni por nova preslaborejo, kies konstruigo ni ĵus komencis. Ni deziras la kapitalon de diversaj donontoj en malgrandaj sumetoj aŭ la tutan sumon de unusola dononto. La konstruaĵo koston ĉ. 150000 gmk. Ni garantias rentumon ĝis 10%, laŭ postulo de la donontoj. Ofertojn petas

Fratoj Jung,

presistoj de „Esperanto Triumfonta“,  
Horrem bei Köln, Germ.

## La Interŝanĝo

Franca kaj Esperanta revuo ilustrita por korespondantoj, interŝanĝoj kaj komercaj interrilatoj aperas sep fojojn jare, estas 32- aŭ 40-paĝa, ne enkalkulante la liston de la aligantoj sendatan nur al la abonintoj.

Jara abonprezo: 10 francaj frankoj. Specimena n-o: 1 franca franko aŭ 4 respond-kuponoj.

A. Bonnefous, Direktoro, Béziers (Hérault),  
Francujo, 3, rue du Capus, et 22, rue Vlnnet.

## Kopilibro de Günter

por skribado kun ahato aŭ kraĵono por ĉiuj celoj. Eksperto al ĉiuj landoj. Kapablaj reprezentantoj serĉataj. Emil Günter, Freiburg i. Br. (Germ.), Schillerstr. 54. Fabriko de kopilibroj.

## Anoncetoj.

Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj anoncetoj (nur akceptataj por minimume du sinsekvaj presoj) koston po du presoj kaj po 20 vortoj 0.20 dol., 0.50 hfl., 1 nord. kr., 1 All., 1 sviz. fr., 1 pes., 2 franc. aŭ belg. fr., 5 lir., 7 fmk., 8 kč., 25 gmk., 60 hung. kr., 250 pmk., 250 austr. kr., internacie 5 amp. resp. kup.; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncetoj laŭdezire de la abonkonto, de aliaj ni enpresas anoncetojn nur post antaŭpago. — Anoncetoj devas alveni 10 tagojn antaŭ publikigo.

FIANĈIĜO. Kiel gefianĉoj salutas: Elisabeth Naumann kaj Eugen Einmal, Düsseldorf, aprilo 1922.

TETSCHEN-BODENBACH, Ĉeĥoslovakio. Adreso: Aug. Felix, Bodenbach a. E. — Kunvenoj ĉiumerkrede je 8 h. vesp.

PROTESTO. S-o Jozue Stelman, Warszawa, Ziota 65, petas nin jenon publikigi: „En n-o februara de Esperantida“ oni skribas, ke mi kaj kelkaj aliaj „aktivis kom ordinaran membron al Tulpolla Esperantida Konsulejo“. Tio estas mensogo, kaj mi plej akre protestas kontraŭ la misuzo de mia nomo.“ Pola Esp. Servo, Bydgoszcz, Kordeckiego 1 a.

SANĜO DE ADRESO. S-ino Elza Merkert en Lodz, Polio, aciglas, ke ŝia nova adreso estas: Lodz, Grabowa 55.

SANĜO DE ADRESO. S-o Konrado Doménech, vicdel. de UEA en Girona, komunikas al siaj karegalj gekorespondantoj sian novan adreson. kiu estas: „Vichy Catalan“, Caldes de Malavella (prov. Girona.) Hispanlando.

KOMERCO. S-o Ivan H. Krestanoff, Nicolaistr. 4 b., Dresden, Germanio, okupigas pri komerco kaj reprezentado kaj petas ofertojn.

AĈETAS AŬ INTERŜANĜAS la numerojn 2—8, 10—18, 20—24, 26, 41 de ET/2021. — S-o E. V. Schade, Wien 1, Franziskanerplatz 3/5.

POR KIA AJN PREZO mi aĉetos la n-ojn 1—12 de ET kaj la marian numeron de „Esperanto“ (UEA) de l' jaro 1921. Adreso: Deziderlo Tövisy, Targu-Mureş, Rumanio, Librejo Révész.

LA PLEJ FAMAJ SONORIL-KONCERTOJ en la tuta mondo okazas en Mechelen (Malines) apud Antverpeno en Belgujo. Petu informojn de: Inlichtingsbureau (Inform-oficejo), Bruel 125, Mechelen.

## Generalo Sebert

kore dankas ĉiulandajn Esperantistojn, kiuj sendis al li kondolencojn okaze de la morto de lia amata edzino.

## La lasta batalilo.

Vivante ĉiam sola en aparta regiono, mi ofte elekis propagandmetodojn, kiujn la mezeŭropaj Esperantistoj ne bezonas uzi. Mia lasta peto pri helpe estas, ke gravaj, laborantaj ge-Esperantistoj inter ordinaraĵ grupoj, aŭtoritatoj, lernantoj, instruistoj, profesoroj kaj infanoj sendu poŝtkartojn ilustr. aŭ leterojn al unu el la tri membroj de la lerneja komisiono en Grenaa, Danl.:

al S-o Pastoro Trandsen  
aŭ S-o Bankdirektoro Buhl

aŭ al Urbkonsilanto Former Rasmussen  
La adresoj sufiĉas. La tri sinjoroj havas konatojn, kiuj volonte tradukos ĉion.

Koran antaŭdankon!

S-ino Magda Mammen, del. UEA,  
Grenaa, Danlando.

## Eksperto serĉata!

Aŭstria fabriko de ŝelkoj, gumaj ŝtrumpet-portiloj kaj pasamentoj, blankaj kaj koloraj kolumoj el tolo kaj pikeo serĉas komercajn interrilatojn kun eksterlando.

Specimena sendo jam kontraŭ 10 fr. frankoj aŭ alilandaj banknotoj samvaloralaj en rekomendita letero.

Oskar Popper, Wien 7, Zollergasse 37.

Reprezentantoj serĉataj.

Korespondas Esperante, germane, france kaj itale

## HUNGARA VINO.

La Tokaj-Hegyalla-Provinca Vin-komerc. A. S. Budapest

malmultkoste

eksportas unuarangajn vinojn al ĉiuj landoj. (En lastaj monatoj ni sendis al Brazilio, Ĉinio, Nederlando, Germanio.)

— Botelvinoj. —

Mondfamaj „Tokaj“-vinoj!

Serlozaj firmoj kaj reprezentantoj ricevas ofertojn pere de

Paŭlo Balkányi, Budapest VI,  
Hajos u. 15.

500 ADRESOJ DE JAPANAJ KOLEKTANTOJ de poŝtkartoj ilustritaj, poŝtmarkoj ktp. estas aldonitaj al BES-adresaro (4-a eldono) aperanta en majo 1922. Prezo: 1.50 sviz. franko. Sendu bankbiletojn aŭ neuzitajn poŝtmarkojn! Por Aŭstrio, Polio, Rusio 50% valutrabato. Mendu ĝin tuj, se vi volas certe havi BES-adresaron! Karel Jelínek, Poŝtako 60, Vinohrady, Ĉeĥoslovakio.

EDZ(IN)IĜO. La astrologistino s-o J. Rabestana (la mlatera viro, kiu antaŭdiris la mortigon de la fondinto de Portugala Respubliko kaj multajn aliajn okazintaĵojn tiulandajn, ĵus trovis la sekretojn, por ke iu povu sukcesigi en feliĉa edz(in)igo aŭ eviti malfeliĉan edz(in)igon. Ŝi estas scienca eltrovaĵo facilkomprenebla por ĉiuj personoj. Bonvolu sendi vian nomon, adreson, naskiĝdaton kaj la sumon de 10 (dek) frankoj aŭ laŭkurzan samvalutan sumon en monspecoĵ vialandaj, se vi volas sciiĝi pri tiu mirindaĵo, kiu feliĉigos vian tutan vivon. Mi respondas laŭvole en Esperanto, portugala, franca aŭ angla lingvoj. Adreso: R. Pascoal de Melo, 105, 1-o, Lisbono, Portugalio.

POR FACILIGO DE L' INSTRUADO kaj neniam erara apliko de l' prepozicioj, afiksaj, partipoj ktp. mi serĉas tiulandajn instruistojn, eble simple sed klare desegnitajn sur poŝtkartoj, kunmetote taŭgajn por multobligo. Kiam la kolekto sufiĉas (eble fino de 1922) mi promesas sendi al ĉiuj kunlaborinto la rezultaton. — Hans Böning, Stuttgart, Libanonstr. 45.

SIGELMARKOJN Esperantajn, Insignojn, kaŭĉukajn stampilojn por societoj, poŝtkartojn liveras tuj Jozefo Kocodrök, gravuristo, Wien X, Arthaberplatz 3—14. Oni korespondas en lingvoj: ĉeĥa, germana, rusa kaj Esperanta. Postulu specimenson de Esperantaj sigelmorkoj kontraŭ 2 respond-kuponoj.

PASTRO L. W. CRONKHITE, post kvardekjara laboro, ekgiĝos sian mision laborkampon ĉe Bassein, Burma, en frua aprilo, por reiri al sia usona hejmo. Nova adreso: Greenwlich, N. Y., U. S. A., kien li alvenos ĉirkaŭ la unua de junio. Li aparte bonvenos leterojn kaj poŝtkartojn ilustritajn montrantaj gefianĉojn. Responde li sendos leterojn kaj Burmajn kaj Hinduajn kartojn.

Korespondo kaj Interŝanĝo.

Fraŭlo Slava Bohanus (20-jara), Slezska Ostrava, u poŝty, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj aŭ leteroj kun ĉiulandanoj, ankaŭ kun fraŭlinoj pri amikaj temoj.

## Nederlanda Anonima Societo Luksa-pano Fabrikoj

antaŭe Henri J. Carels.

50 Butikoj:

Den Haag, Haarlem, Amsterdam.

## Luntejo Carels

(ĉefo: H.A. Scherwächter)

63 Weimarstraat, Den Haag.

Oni parolas Esperanton.

## Nederlanda Esperanta Komerc-Oficejo

(Nederlandsch Esperanto-Handelsbureau)  
Diernaardelaan 64, Rotterdam (Hollando)

Tradukas cirkulerojn, komercajn leterojn ktp. el Esperanto en nederlandan lingvon, kaj sin ŝarĝas per la dissendo de cirkuleroj.

Prokuras komercajn adresojn.

Prizorgas la anoncadon en Nederlando.

Intrrilatigas kun nederlandaj komercistoj kaj industriistoj.

Sciigas la kurzojn de valutoj kaj valorpapiroj.

Unuaranga

## HOTELO VICTORIA BYDGOSZCZ-BROMBERG

(Polujo) apud la Stacidomo

rekomendas sin al la Publiko.

Restoracio.

Vinejo. Renkontejo por Fremduloj.

Importo. Eksporto.

## Pollanda Komerca Agentejo

Adolfo Oberrotman, Varsovio, Krak-Przedm. 10

deziras ligi komercajn rilatojn kun gravaj eksterlandaj firmoj, speciale en teknikaj maŝinoj, manufakturo kaj galanteriaj artikloj; donas ĉiujn informojn pri la polaj komerclokoj.

Nur pograndaĵ firmoj bonvolu sendi ofertojn kun specimenoj aŭ katalogo.

Reprezentado. Perado.

Mr. Watson, Wien, 18, Genziggasse 138/12, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kun Estonio, Latvio, Finnlando kaj aliaj.

Max Hubl, Salzburg, Aŭstrio, Auerspergstrasse 54, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kun ĉiuj landoj, precipe eksterŝtataj. Ankaŭ interŝanĝas poŝtmarkojn.

S-ano Ulmer Lajos, Budapest 6, Kerület, Csengeri-utca 49, Hungarlando, deziras interŝanĝi leterojn, monerojn, poŝtmarkojn kaj ĵurnalojn kun ĉiulandaj gesamideanoj.

Sindetenantoj Esperantistoj el la tuta mondo! Se vi deziras interkunligon kaj korespondadon kun Rusĉuka Lernanta Neŭtrala Sindetenanta Societo „Sobroco 16“, turhu vin al s-o Ivan Kovačev, strato Malriĉa Kvartalo 37, Rusĉuko, Bulgarlando.

P. Th. Schneider, Lanshausstrasse 3, St. Gallen, Svizujo, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. Sendu almenaŭ 50 malsamajn nedifektajn poŝtmarkojn kontraŭ la sama valoro de svizaj poŝtmarkoj.

S-o M. Osaka, med. fak. studento, 185 Kaminšigaŝa, Okajama, Japanujo, deziras interŝanĝi kun instruistoj desegnaĵojn kaj menlaborojn de gelemantoj.

Antonio Kerekes, Budapest VI, Eakltér 8, Hung., deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj interŝanĝas poŝtmarkojn.

Eugeen Darden, St. Jobstraat 65, Antwerpen, Belgujo, deziras korespondi per poŝtmarkoj kun ĉiuj landoj, escepte Germanlando.

C. Rouwens, 17 rue des Wallons, Anvers, Belgulo, deziras korespondi kun Francujo, Germanujo kaj Serbujo.

S-o Juul Karnas, juna instruisto, Poortstraat 4, Berchem apud Antwerpen, Belgulo, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kun la tuta mondo.

Pro multeco de ricevitaĵoj ne ĉiuj skribintoj povas esti tuj respondataj. Al ĉi tiuj mi afable petas senkulpligon. — H. van Beek, Leliestraat 7, Dordrecht, Nederlando.

Ed. Mittersteiner, Bergen 1, Oberbayern, Germ., deziras korespondi kun samideanoj el ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj.

Du samideanoj deziras tutmondajn gekorespondantojn. — Adresoj: Rudolf Pivl, Trautenau, Ĉeĥoslovakio, Pragerstrasse 16; Alfred Hübner, Trautenau, Gebirgsstrasse 46.

Ar. Draaiich, kooperativisto, Braislava, Felbigerova 2, Ĉeĥoslovakio, deziras interŝanĝi poŝtkartojn, leterojn kun geĉiilanduloj, precipe pri demandoj ekonomiaj, ariaj k. a.

## Malkaraj Korbmebloj

riceveblaj el pola fabriko pogranda kaj po-detale. Kompletaj salonoj, konsistantaj el 6—10 pecoj (tablo, sofo, du foteloj, du seĝoj, unu taboreto, du florpiedeŝtaloj kaj unu florujo) koston nur 72 000—82 000 pol. mk.

Postulu fotogr. desegnojn kaj informojn de

Prof. Miecz. Sygnarski,  
Bydgoszcz Polio Kordeckiego 19

## UEA-anoj en Ĉeĥoslovakioj

Ĉu vi komparis la staton de UEA kun tiu de la ĝenerala movado Esperantista en nia respubliko? UEA ne funkcias ĉe ni tiel, kiel ĝi devus funkcii, UEA ne havas ĉe ni tiom da membroj, kiom ĝi povus kaj devus havi! Kiu estas kulpa? Ni, delegitoj!

Ni organizu nian laboron por UEA, en UEA kaj per UEA! Ni postulu laŭstatutan starigon de teritorio de UEA en ŝtaliĝoj de nia respubliko kaj tiel ni helpu al nia superserĉita Centra Oficejo, decentralizante la administradon!

Kion ni bezonas al tiu ĉi celo?

1. Energian, spertan personon, fervoran delegiton, kiu emus kaj kapabliĝis preni sur sin la oficon de ĉefdelegito. — Ĉu neniu tia estas inter ni?

2. Teritorian kazon, kiu enspezus el la 10%-a rabato duonon, cedotan de la delegitoj. — Ĉu ni delegitoj tion ne cedos volonte?

Kaj la rezultato?

Plifaciligita, plirapidigita administrado, grava helpo al nia Centra Oficejo, disvastigo de UEA mem kaj de ĝiaj praktikaj servoj, klara montro de idealaj celoj de UEA al nia diversnacia popolo. Kiel fari la unuan paŝon?

Kiu el vi, delegitoj, konsentas pri supraĵ linioj, skribu tuj al mi per poŝtkarto: „Mi konsentas“ kaj mi ĉion are sendos al la Centra Oficejo. La komisiono decidis pri la starigo de teritorio kaj voĉdonigos pri la ĉefdelegiteco.

Ni agu rapide, dum nia tutĉeĥoslovaka konferenco en Brno (Brünn) ni jam pridobatu la novan laborplanon!

Per UEA venkos Esperanto!

O. Sklenčka, del. de UEA  
Hradec Králové.

## Abonantoj de ET

en la landoj

Aŭstria: Ferd. P. Huber, Münchsberg 5, Salzburg; por Wien „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeffer), Wien II/1, Postamt 34

Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen. Poŝtĉeka n-o 284 20.

Bulgara: Georgi Ĥr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Soĥa, Ĉeĥoslovakia: Otto Sklenčka, Hradec Králové. Otto Lumpe, Trautenau.

Estonia: Est. Esp. Unuiĝo, postkast 6, Tallinn.

Finna: O/Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.

Franca: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Cligny, Paris 9.

Hispana: Konrado Doménech, Caldes de Malavella, prov. Girona, Vichy Catalan.

Hungara: Paŭlo Balkányi, Hajos-utca 15-II-2, Budapest VI.

Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamači, Aojama, Tokio.

Jugoslava: D-ro Dušan Maruzzi, Zagreb, Jezuitska ul., br. 1.

Litova: Paŭlo v. Medem, Smelnu g-ve 12, Kaunas (Kovno).

Pola: Adolfo Oberrotman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 8125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prangel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.

Rumana: Esperanto-Oficejo Cluj.

Sveda: Förlägsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1. U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

Franz Rosenegger, Aschach a. Donau, Aŭstrio, deziras korespondadon kun gesamideanoj ĉiulandaj (letere aŭ karte); kolektas ŝtatan papermonon.

F-ino Emma Reinhardt, Stuttgart, Hauptstädterstr. 69, Germ., deziras korespondadon kun gesamideanoj tutmondaj per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj.

Kontraŭ 50 poŝtmarkoj vialandaj mi sendos 50 germanajn. Akceptas aĉetojn por ĉiuj germanaj komercaj. Wilhelm Hilbers, Hamburg 13, Grindelallee 99.

S-o Erich Hunger, Friedrichstr. 4, Merseburg a. Saale, Germ., deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj (bfl.) kun ĉiuj landoj, precipe kun fratinoj.

S-o Rud. Ifo Biertümpfel, Lauchstedter Str. 45, Merseburg a. S., Germ., deziras korespondi kun ĉiuj landoj.

Instruist-seminariano Franz Lischke, Merseburg, Germ., Roter Feldweg 4, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj korespondi kun ĉiulandanoj, precipe fratinoj.

S-o Ernst Reisse, Merseburg, Germ., Weissenfelsen Str. 26, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj leteroj kun ĉiuj landoj.

S-o Erich Kreyer, seminariano, Gutenbergstr. 27, Merseburg a. S., Germ., deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn (bfl.) kun la tuta mondo.